

DETROIT INVITAS VIN DENOVE

NOVEMBER 1941 NOVEMBER

U N U E C O E S T A S F O R T O
Mi juras lojalecon al la standardo de Usono, kaj al la respubliko, kiun ĝi Simboligas, unu nacio, nedividebla, kun Libereco kaj justeco por ĝiuj.

U N U E C O E S T A S F O R T O
L'espero, l'obstino kaj la pacienco Jen estas la signoj per kies potenco. Ni paŝo post paŝo post longa laboro atingos la celon En gloro.



LA MONATA BULTENO DE LA ESPERANTA-ASOCIO DE NORDA AMERIKA
Joseph Leahy, General Secretary
Central Office 1410 H Street, N.W. Washington, D.C.
J.R. Scherer, Pres. Los Angeles, Calif. -- E.G. Dodge, Ch. Exec. Comm. Wash. D.C.

Number One \$1.00 per year--anywhere 10c per copy NOVEMBER 1941

EVERY ESPERANTIST SHOULD BE A MEMBER OF E A N A, With "American Esperantist" one year ONLY \$2.00. Add 75 cents and get the JARLIBRO (an encyclopedia of Esperanto information). JARLIBRO is an imperative necessity to anyone wishing to be in close touch with the Esperanto movement--its list of delegates, the world over, is invaluable to correspondents or travelers.

UNIVERSITY EXTENSION COURSE IN ESPERANTO opened October 23, in Seaver Hall, Harvard University, with G. Winthrop Lee (President Esperanto Society of Boston) instructor.


PREZIDANTO SCHERER nun loĝas en sia nova domo, 3222 Larissa Drive, Los Angeles, California.

ATENTU, LIBROLEGANTOJ KAJ LIBROLEGANTOJ! Nia Oktobra numero anoncis novan servon kiun EANA estas preta plenumi al registritaj membroj de la "Esperanta Rondo de Librolegantoj," per pruntedonado de bonaj libroj je malgranda kosto. La unua sinregistrinto por uzi la novan servon estis F-ino Ann E. Beatty, la mense kaj korpe forta pli-ol-okdekjarulino de Cardington, Ohio, ĝiam vigla laboranto por Esperanto dum multaj jaroj. Ni gratulas S-aninon Beatty. Multaj povas sekvi ŝian ekzemplon, kun kultura profito por si mem.

A NEW ESPERANTO CLUB. "Klubo de Verda Stelo" has been organized in Milwaukee, Wisc., by Miss Emma Jungton (High School Teacher), John Jungton (He organized the Milwaukee Esperanto Club in 1924) Rev. Giles H. Sharpley (Sec'y) and Stanley A. Klukowski--the latter two are EANA members, Rev. Sharpley very active in nia movado for many years in Iowa--recently moved to Wisconsin. The "Milwaukee Journal" of Oct. 20th shows a 4x5 picture of the above group with appropriate write-up. Sorry we do not have space for it in this issue. B O N V E N U !

In a later issue of the "Journal" we have read (about 3 columns) some very interesting items about the first meeting, and the personalities present. Delighted to find the names of Mr. and Mrs. Oscar Muenzer--they and Rev. Sharpley have added lustre to several of our annual congresses, and it is, assuredly, a great pleasure to hear of them again taking an active interest in Nia Afero. S-ro Klukowski succeeded in capturing a reporter and holding him long enough to get a good story before the public, regarding Esperanto. He learned Esperanto in Warsaw, before the World War--he came to America also before that time (LUCKY). VIVU ESPERANTO

ALWAYS WEAR THE GREEN STAR, the Esperanto emblem. The one at the left, Green background, golden E and ball protectors on points. Screwback fastening 40¢, Safety catch for Ladies 50¢. One at right is a real novelty. Green Star on White background, made of beads on leather back, with safety catch, 35¢. Made by the Kiowa Indians of Oklahoma. The pictures are actual size of the two designs. The metal Star was made in the first place to sell for \$1. but we are not a commercial institution 'out for the money'--Oh yes we need it, but we know that 'the other fellow needs it also'. U N U E C O E S T A S F O R T O



J. F. MORTON DIES; MUSEUM CURATOR

Head of Paterson Institution
Was Bibliophile and Also a
Collector of Minerals

Special to THE NEW YORK TIMES.

PATERSON, N. J., Oct. 7—James F. Morton, curator of the Paterson Museum and nationally known bibliophile, author and collector of rare minerals, died this morning at St. Joseph's Hospital here from injuries suffered last night when he was struck by an automobile in Totowa Borough, near here. He was 70 years old.

Mr. Morton came to Paterson in 1925 to take charge of the museum, and since then had had an active part in the city's cultural life.

Born in Littleton, Mass., on Oct. 18, 1870, he was the son of the late James Ferdinand Morton, one-time head of Phillips Academy in Exeter, N. H., and the late Caroline Edwards Smith Morton. He received Bachelor of Arts and Masters degrees at Harvard, from which university he was graduated cum laude in 1892. Two years later he graduated from the School of Expression, and later gained prominence as a lecturer on social and literary topics. For a time he was a reporter on The Boston Globe and Pacific Coast papers.

He was a descendant of one of America's oldest families. One of his ancestors, the Rev. Samuel Francis Smith, was the author of "America."

Taking an active interest in the Henry George single-tax program, Mr. Morton wrote two books on the subject, "Single Tax Review" and "The Philosophy of the Single Tax." An ardent champion of Negro rights, he wrote a book entitled, "The Curse of Race Prejudice." Recently he had completed a volume having to do with the Ketcham Family. He had written many poems.

Mr. Morton was a member of the New York bar.

He leaves a widow, the former Pearl K. Merritt.

KUN PROFUNDA BEDAŬRO ni ricevis informon pri la morto de S-ro James F. Morton, malnova Esperantisto kiu estis de 1935 ĝis 1939 Vic-Prezidanto de EANA. Pli frue li estis Estro de la Aga Komitato de EANA, kaj Prezidanto de la Novjorka Esp-Asocio. Ĉiam afabla, ĉiam tolerema, li postlasis multajn kaj sincerajn amikojn. Al lia familio ni sendas esprimon de nia kora simpatio.

HERE IS EASY MONEY. The Esperanto Association of North America offers 24 prizes in order as follows: \$10; \$5; \$3; \$2; 5th to 24th \$1 each for the best last line to the following Limerick:



Esperanto's the language for me,
When writing to friends over sea,
It sure is a winner
For both saint and sinner



Make your last line rhyme with the first two lines. Send as many entries as you wish. With each entry send 10c, coin, for "ESTU PRETA" the key to Esperanto, which is a dictionary of the most common words, grammatical rules., of Esperanto, the International Auxiliary Language. Contest closes with the postmark of January 31, 1942. The winners will be announced in the Bulletin of February or March. Address: "ESPERANTO" 20 W. Washington St., Oklahoma City, Okla.

N.Y. ESPERANTISTS MOURN, AND REJOICE. At the first indoor meeting of the season, October 18th the Esperanta klubo Harmonio had as its guest speaker Dr. A. A. Brill, world-famed psychiatrist. Dr. Brill, after conferences with Dr. Freud in Vienna, introduced psychoanalysis in America; he has since become world-known as an author and eminentulo in applied psychology. (He is also a Ph.D., and M.D.) He thrilled his hearers when he introduced his talk in Esperanto, as well as when he told of the difficulties he overcame in his travels in Europe by his use of Esperanto. As far back as 1905 he did some translations into Esperanto. With others present at the meeting, he had waited for hours at the Hoboken pier, when Dr. Zamenhof's boat was late in its arrival for the 1910 congress in Washington.

His one hour talk elicited considerable discussion from the membraro and guests at the overflow meeting. Already a member of EANA, he was 1 of 5 new Harmonio members. So that, if N.Y. Esperantujo bemoans the loss of a famed Esperantist--James F. Morton--who was taken from us prematurely, through an automobile accident, it is happy to resurrect into activity, so famed a samideano as Dr. Brill.

Also present were Dr. and Mrs. Walter Lippman (recent arrivals from Vienna); the Presidents and others from the Brooklyn and N.Y. Esperanto Societies.

GOOD NEWS FROM WARSAW. A recent issue of the Geneva "Esperanto" carries the photograph of a postal card from Lidia Zamenhof in Warsaw and dated June 25th 1941. This is the most authentic--and most joyful news from Lidia in many months.

DETROIT*1942

ESPERANTO CLASSES recently reported: Beverly, Mass.,--Miss Marion Russell; Albany, Calif., Fernando Penaloza Jr; Philadelphia, Mrs. M. Rouse; Lima, Ohio, Mrs L.K. Beecher; Elmira, N.Y., Mrs. Eliza E. Smith.--Tell us about yours!!!!!!

ESPERANTO-RONDO AMIKA, Boston, recently elected officers: President Miss Edna Mosher, V-Prés. Mrs. Palmer L. DeWolfe, Sec'y Miss Roan U. Orloff, Treas., Roy B. Anderson. They are already planning, with the Boston Esp-Society, for a Zamenhof celebration in December. VIVU BOSTONO.

CONGRATULATIONS to Mary and Armin Doneis (Pharr, Tex.) on arrival of a daughter Oct. 7th.

THE 1941 E.A.N.A. SONG SHEET.

No. 1. "O Beautiful Our Country!"
Melodio: "Jerusalem the Golden."

Ho bela patrolando!
Ne estu via cel!
Nur riĉo de l' komerco,
Kaj grandkampara bel!
La mizerulojn levu
Al vera homa ĝoj!
Por subpremitoj estu
Al liberec' la voj'.

Volante niaj patroj
Oferis sin pro vi,
Sufervis kaj laboris,
Pensante ne al si;
Ilia vivo lumas
Ankoraŭ kiel sun!
Ilia sango fluas
En via vivo nun.

Ho bela patrolando!
Ni amas vin en ver',
Kaj preĝas, ke vin benu
La Ĝojo kaj Liber';
La Justo via sceptro,
La Leĝo via tron';
Kaj Paco la juvelo
Plej brila sur la kron'.

N-ro 2. "Jingle, bells!"
(Kantu la liniojn defoje.)

Gaje nun, gaje nun!
Gaje sur la voj'!
Iru kune al labor'
Kamarade ni kun ĝoj'!

N-ro 3. "He's a Jolly Good fellow."
(Ĉiu unua linio, trifoje kantota.)

Ni estas samideanoj (trifoje)
Neniu ĝin povas nei.

Ni estas bonaj amikoj,
Neniu ĝin povas nei.

No. 4. "Annie Laurie."

En Maksveltona valo
Loĝadas anĝelin',
Kaj tie ŝi promesis
Eterne ami min.
En ĉiu vivmoment'
Mi revas nur pri ŝi,
Kaj por bela Anjo Laŭri
Kontente mortus mi.

Ĉe ŝiaj fepaŝetoj,
La rosa malpezec';
En ŝia dolĉa voĉo,
Venteta sopirec'.
Al mi la tuta mond'
Konsistas nur el ŝi,
Kaj por bela Anjo Laŭri
Kontente mortus mi.

N-ro 5. "Hejm' Sur La Step'."
(Home on the Range.)

Ho, hejm' sub la bel' de sennuba ĉiel',
Kun la cerv', antilop' kaj bizon';
Malofte la vort' malkuraĝa pri sort',
En la vasta paŝtej-region'.

(Rekantaĵo.)

Hejm', hejm' sur la step',
Kun la cerv', antilop' kaj bizon',
Malofte la vort' malkuraĝa pri sort',
En la vasta paŝtejregion'.

Kiel ofte al stel' en la nokta ĉiel',
Sub la bril' de la astra trezor',
Dum longa rigard' ni scivolis pro ard',
Ĉu sur ili superas la glor'.

NOTE: on song, "God Bless Amerika." Many requests received. This song presents more than average difficulty in translation. A good singable translation was eventually presented, but it cannot be published, because owners of copyright reserve all rights.

NOTE: on authors of translations, or of Esperanto song words. No. 15, Dr. Zamenhof. Nos. 1, 3, 4, 9, 12, 14, 16, now to us unknown. No. 5, George A. Connor, (first published in "O Brasil Esperantista.") Nos. 2, 7, 17, E.G.Dodge. Nos. 6, 8, 11, 13, 18, E.G.Dodge and A.E.Regal, (verkitaĵ en kunlaborado.) Nos. 10, 19, anonymous. Nos. 20 to 27 inclusive, H.I.Keyes, reprinted from Amerika Esperantiste of April, 1936.

N-ro 6. LA RIVERO SŬANI.

Tre fore, ĉe Rivero Sŭani,
En malproksim',
Loĝas gepatroj-maljunuloj;
Kor' tien urĝas min.
Travagas mi la vastan mondon,
(Kor' en mallum'!)
Sopiras al bieno hejma,
Hejm' de l' gepatroj nun.

(Rekantaĵo.)

Ĉie mi en mond' solecas,
Vagas en dolor'.
Nigruloj! mia kor' tre lacas,
For de l' gepatroj, for!

Ĉirkaŭ la farmo mi vagadis,
En juna aĝ';
Dum tre feliĉaj tagoj, ĝercis,
Kante, kun ĝojvizaĝ'.
Kiam mi ludis kun frateto
Feliĉis ni;
Konduku min al bona panjo,
Tie finmortus mi.

Kabano inter la arbetoj,
Amata tre, --
Ĝi triste en memoron rampas
Dum vagas mi en ve'.
Kiam por mi abeloj zumos
En miela voj'?
Kiam ĉe mi la banĝo tintos
En dolĉa hejma ĝoj'?

N-ro 7. MONIKRIZA PREGO.
(Espero-Kanto.)
Melodio: "Juanita."

Kiam mi revas
Pri l' estonto de la mond',
Neplu bataloj,
Nur pacema rond',
Tiam duboj ĝenas
El la longa histori',
Hombuĉad' tro ofta
Kaj korrompa kri'.

(Rekantaĵo.)

Benul sendanĝerigu
Dio nin, ni preĝas nun!
Brilu -- el la mallumo --
Homfrateca sun'!

Ĉu novespero
Kreskas nun en mondkor'?
Ĉu timo flugos
Kaj malfido for?
Jes, se bonvoluloj
Sindonemos en labor',
Jes, se amo iĝos
Naciar-trezor'.

N-ro 8. NIGRULA JOĴO.
("Old Black Joe.")

Pasis la tagoj de l' juna ĝaja kor';
Pasis l' amikoj el kotonkampoj for, --
Pasis de l' tero al land' pli bona. Ho!
Ilia dolĉa vok'!
"Maljuna
Nigrul', Ĝo!"

(Rekantaĵo.)

Mi venas! Mi venas!
Mia kap' sin klinas, do --
Mi aŭdas -- dolĉa vok'!
"Maljuna
Nigrul', Ĝo!"

Kial mi ploras, sen rajto por dolor'?
Kial ĝemspir', ĉar kunuloj restas for? --
Trista, ĉar plu ili ne vidiĝas? Ho!
Jen, ties dolĉa vok'!
"Maljuna
Nigrul', Ĝo!"

Kie la koroj feliĉaj, sen emu'?
Karaj infanoj, sidantaj sur genu'? --
Transis al land', kien mi sopiras. Ho!
Ĉiele dolĉa vok'!
"Maljuna
Nigrul', Ĝo!"

N-ro 9. AL LA ESPERANTISTARO.
(Melodio: "Men of Harlech.")

Al la Esperantistaro
Tie ĉi kaj trans la maro
Nia samideanaro
Turnas sin kun am'.
Malprosperu ĝi nenie,
Dio domu ke ĝi plie
Kresku dum la jaroj ĉie
Gis grandega fam'.
Kiel familioj
Vivu la nacioj;
Kresku frata amikeco,
Ĉesu la envioj.
Baldaŭ homa batalado
Kaj ĝisnuna militado
Pro la interkomprenado
Malaperos jam.

N-ro 10. LIGO INTER NI.
("Blest be the tie that binds.")
Melodio: "Dennis."

Benata la lig' inter ni
De samidean-harmoni'!
La Esperantista bonvol' por homaro
Similas la amon al Di'.

N-ro 11. MALNOVA KENTUKI-HEJMO.
("Old Kentucky Home.")

La negroj ĝojas en la Kentuki-hejm',
Ĉar brilas somera la sun'.
Herbejoj floras, maizo en matur';
Sonas ĉiam birdaj kantoj nun.
Infanoj ludas senzorge en kaban',
Gajege, kun juna la kor';
Sed por ni frapis missorto ĉe la pord',
Do al vi, Kentuki-hejm' -- dorm-hor'!

(Rekantajo.)

Mia karulino,
Ne restu vi en plor'!
Ni ekkantos nun reve pri Kentuki-hejm',
Kara lok' en malproksim', hejm' de kor'!

Oni ne plu ĉasas didelfon en arbar',
En kampo, aŭ ĉe rivera bord';
Oni ne plu kantaŝ sub lumo de la lun'
Sur la benko apud kabana pord'.
La tagoj pasas nubombre en malĝoj'
Anstataŭ sur gaja la kor';
Ĉar nun disiĝas nigrulo de nigrul',
Do al vi, Kentuki-hejm' -- dorm-hor'!

Kun kapoklino kaj dorsoklino, ho!
Nun ĉien ja devas nigrul'.
Post pluraj tagoj finiĝos la klopod'
Por la sukerkana laborul'.
Post pluraj tagoj ne plu la peza ŝarĝ',--
Neniam de dorso nun for.
Nur pluraj tagoj por stumbli en la voj' --
Do al vi, Kentuki-hejm' -- dorm-hor'!

N-ro 12. VIVU LA VERDA STEL'.
("Hail, hail, the gang's all here!")

Vivu la verda stel',
Vivu Esperanto,
Vivu Esperanto!
Vivu la verda stel',
Vivu Esperanto nun!

Vivu E. A. N. A.,
Asocio nia
Nordamerikana!
Vivu E. A. N. A.,
Asocio nia nun!

N-ro 13. MAS'O SUB MALVARMA TER'.
("Massa in de cold, cold ground.")

Tra l' herbejoj nun elsonas
De l' negroj vea kant',
Dum la moka-bird' eltonas
Kanton de la korgojant'.
Kie la hedero ĉarmas,
Malgraŭ tombnizer',
Nun maljuna Mas'o dormas,
Dormas en la frosta ter'.

(Rekantajo.)

En maizo-kampo
Sono de sufer'!
La nigruloj ĉiuj ploras, --
Mas'o sub malvarma ter'!

Estis foliar' falanta
Kiam aŭdis ni
Lin malforte nin vokanta,
Ĉar maljuna estis li.
Nun oranĝo-arboj floras
Sub ĉiela blu';
Nun someraj tagoj gloras, --
Mas'o vokas ne, ne plu.

Mas'o igis la nigrulojn
Ami lin el kor'.
Nun, forire, la restulojn
Lasas li en morna plor'.
Mi ne iras al laboro
Pro la larmo-flu';
Provas fuĝi el doloro
Per la tinta banĝo-bru'.

N-ro 14. LONGA, TORDA VOJO.
("Long, long trail.")

Estas longa torda vojo
En landon dolĉ-revan nun
Kie kantas najtingalo
Kaj radias lun';
Estos longa, longa nokto,
Soleca tre restos mi.
Ĝis la tag' kiam mi venos
Laŭ la longa voj' kun vi.

N-ro 15. LA ESPERO. (Zamenhof.)

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.
Ne al glavo sangon soifanta
Ĝi la homan tiras familion:
Al la mond' eterne militanta
Ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj,
Kaj rapide kreskas la afero
Per laboroj de la esperantoj.
Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj:
Sed dissaltos la obstinaj baroj,
Per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.
Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝos,
Ĝis la bela sonĝo de l' homaro
Por eterna ben' efektiviĝos.

N-ro 16. FARU LABORON NUNE.

("Work, for the night is coming.")

Faru laboron nune
Jam en la vivmaten';
Dum la roseroj brilas
En la korgarden'.
Tempo rapide pasas,
Ĉiam laboru vi;
Baldaŭ la nokto venos,
Kiam ĉesos ni.

Faru laboron nune
En la tagmeza glor';
Estu laborolena
Ĉiu hela hor'.
Arde, la suno brilas,
Tamen fortigu vin;
Venos la ripozado
En la tagofin'.

Faru laboron nune
Sub la vesperĉiel',
Kun la rigardo ĉiam
Sur la vivocel';
Dum en ĉielo mortas
Lasta la sunradi' --
Jes, ĝis la plena nokto --
Laboradu vi.

N-ro 17. RESTU KUN MI.
("Abide with me, fast falls the eventide.")

Restu kun mi, nun falas la vesper';
Mallumo kreskas, restu Vi l' esper';
Ho, Eternulo, ho, helpanto Vi
Por mi senhelpa -- restu do kun mi!

Ĉiam por forto mi bezonas Vin:
Kontraŭ pekad' la graco ŝirmas min.
Tra dubo min, tra ĝojo gvidas Vi:
En nub', en lumo, restu Vi kun mi.

Mi timas nel' Pro via dolĉa voĉ'
Sufero-larmoj fluas sen maldolĉ'.
Eĉ morto ne timigas min, se pli
Triumfigante restas Vi kun mi!

N-ro 18. AMERIKO, PATRUJO.

("My country, 'tis of thee.")

Patrujo -- kantas mi
Pri liberec', kaj vi,
Ho, mia land'!
Prepatra vivesper'
Vi, kaj pilgrimfier';
Eĉadu montliber'
Je ĉiu rand'.

Ho, naska lando, ni
En nobla harmoni'
Tre amas vin.

Roktemploj, valoj, mont',
Arbar', kristala font',
Plej karaj en la mond',
Ĝojigas nin.

Aŭdiĝu sur la vent'
Tra la arbarsilent'
Libero-ton'!
Ekvibru homa lang',
Ĝojbrilu ĉies vang',
Lautkantu monta lang'
En longa son'!

Aŭtor' -- gepatra Di' --
De liberec', al Vi
Jen nia preĝ':
Restu la land' en bril',
Libera ĉiu fil'!
Al Vi ni -- ho, ŝirmil' --
Nin turnas, Reĝ'.

N-ro 19. LA VENKO. ("Jolly good fellow.")

La venko nepre alvenos,
La venko nepre alvenos,
La venko nepre alvenos,,
Ĝis venko laboros ĉar ni!

The Amerika Esperantisto for April, 1936, published the words of twenty-five songs written by H.I.Keyes. The following two pages reprint several of these, selected for their popularity or for their value as rallying songs.

N-ro 20. "Lead Kindly Light."

Min tra nebuloj, Lumo, gvidu Vi --
Konduku min!

En nokt mallumo erarvagas mi --
Konduku min!

La vojon montru -- povas vidi mi
Nur paŝon, sed por mi sufiĉas ĝi.

Antaŭe mi ne preĝis Vin ke Vi
Konduku min;

Elekti vojon tiam volis mi --
Nun gvidu min!

Memvolon, spite timo, amis mi;
Fieris mi -- kompaton sentu Vi!

Longtempe Via povo benis min --

Min ŝildis ĝi;

Dangeron ian -- mi ne timis ĝin --
Vin fidas mi.

Ne plu mi vane sopiradis por
Trankvilo, kiu longe restis for.

N-ro 21. Laŭ sekventa melodio:
"When Johnnie comes marching home."

Renkonte ni venas tien ĉi --
Ho, hura ho!

Renkonte ni venas tien ĉi --
Ho, hura, ho!

Renkonte ni venas tien ĉi --
Sam-ideanoj estas ni --

Ni salutas kore unu alian nun!

La Esperantismo regas nin --
Ho, hura ho!

La Esperantismo regas nin --
Ho, hura ho!

La Esperantismo regas nin --
Kaj simpatio vekas sin;
Kaj ni bone konas unu alian nun!

Disiĝe ni baldaŭ iros for --
Ho vel ho vel!

Disiĝe ni baldaŭ iros for --
Ho vel ho vel!

Disiĝe ni baldaŭ iros for,
Farinte kion ni venis por --

Do ni adiaŭu unu alian nun.

N-ro 22. Laŭ la Kanto:
"How Can I Leave Thee?"

Kiel foriri? Kiel forlasi vin
Kiam la pensoj min ligas al vi?
Batas la koro por
Vi se mi restas for --
Vivi sen vi -- estos
Morto por mi.

Sub la folioj, floroj trovadas sin --
Ilin alpremu, kaj pensu pri mi.
Mi ne forgesos vin --
Vi ne forgesu min!
Mondo sen vi -- estus
Nula por mi!

Birdajn flugilojn -- ilin se havus mi,
Spite la falkoj mi flugas al vi.
Se sago trafus min --
Trafus mortige min --
Tiam, mortante, mi
Pensus pri vi.

N-ro 23. Laŭ la Melodio:
"Onward Christian Soldiers."

Iru ni antaŭen,
Ne laciĝu ni;
Venko nin atendas --
Marŝu, do, al ĝi!
Klara nun la vojo
Kiel "A, B, Co" --
Kun venkemo ĝis ekstremo
Bataladu, do!

(Rekantaĵo.)

Iru ni antaŭen,
Ne laciĝu ni;
Venko nin atendas --
Marŝu, do, al ĝi!

Paco kaj utilo --
Tio ja per si
Estas batalilo
Kiun uzos ni;
Se malhelpa forto
Kontraŭstaros nin,
Ĉiuhore, perlabore
Ni forigu ĝin!

N-ro 24. Laŭ la Melodio:
 "Battle Hymn of the Republic."

Ho, longe vivu Esperanto -- longe vivu ĝi!
 Kaj la Esperantistaro kresku nombre pli
 kaj pli,
 Ĝis kun tuta la homaro egalnombraj estos ni:
 Ho hura, hura, ho!

(Rekantaĵo.)

Longe vivu Esperanto!
 Longe vivu Esperanto!
 Longe vivu Esperanto!
 Ho hura, hura, ho!

Progreso nia ĝis la muno kuraĝigas nin;
 Kiel helpa lingvo, Esperanto jam rajtigas
 sin;
 Jes! kaj post-nelonge nia lando alproprig-
 os ĝin--
 Ho hura, hura, ho!

N-ro 25. Laŭ la Melodio:
 "Listen to the Mocking Bird."

Ni laŭdas vin, Esperanto,
 Esperanto, Esperanto;
 Ni laŭdas vin, Esperanto,
 Kaj al vi tutkore ni dediĉas nin.
 Vi estas bon-helpanto,
 bonhelpanto, bonhelpanto;
 Vi estas bon-helpanto,
 Kaj kun lojaleco ni subtenos vin.

(Rekantaĵo.)

Esperanto, vivu vi!
 Esperanto, vivu vi!
 La mondo, kiel ni, akceptu vini!
 Esperanto vivu vi!
 Esperanto vivu vi!
 La mondo, kiel ni, akceptu vini!

Servadas vi al homaro,
 al homaro, al homaro;
 Servadas vi al homaro,
 Kaj al si la mondo baldaŭ prenos vin.
 Foriĝas nun ĉiu baro,
 Ĉiu baro, ĉiu baro;
 Foriĝas nun ĉiu baro,
 Vi al interkompreniĝo gvidas nin.

N-ro 26. Laŭ la Melodio:
 "Yankee Doodle."

Ridu, ridu -- ho, ho, ho!
 Plorado estas vana;
 Tutkore ridu -- ho, ho, ho!
 Kaj ĉiam restu sana.

(Rekantaĵo.)

Ha, ha, ha! kaj ho, ho, ho!
 Foriru vi, malĝojo!
 Iru -- kaj ne estu tro
 Haltema sur la vojo!

Kantu, cantu -- la, la, la!
 Kantado estas bona;
 Ni gaje cantu -- la, la, la!
 Sed estu ĝi belsona!

Ne ploradu -- ne, ne, ne!
 Sed estu vi gajema;
 Por vi la mondo ridos, se
 Vi estos esperema.

N-ro 27. Laŭ la Melodio:
 "Ach, du Lieber Augustin."

Jen la Verda Stelo --
 Saluton! saluton!
 Saluton al la Stelo --
 Saluton al ĝi!

(Rekantaĵo.)

La Stelo! la Stelo!
 La Verda Standardo!
 Saluton al la Stelo --
 Saluton al ĝi!

Gesamideanoj,
 Saluton! saluton!
 Ho, gesamideanoj,
 Saluton al vi!

Vivu la Afero!
 Ĝi vivu! ĝi vivu!
 Ho, vivu la Afero --
 Triumfon al ĝi!